

& Ŝipisto kaj junulino:

< Rekante 19 el 35 batoj por strofo, entute 385 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4444. El sveda tradukis Martin Strid (2015).>

(#Melodio:

<:35> (do /SoSo dodo /LaLa Tido /re SoSo /do; LaLa /SoSo FaFa /Mi; do /SoSo dodo /La Tido /rere SoSo /do; LaLa /So FaFa /Mi; DoMi /SoLa FaSo /Mi So;So /do remi /falmi redo /Ti do)×11)+

(&Strofoj:

'1 Ju/nunjo iris /akvon preni /ĉe mara /strand'

(×:; **Aŭdu /mia ami/ket'** ;)

kaj /venas jen ŝi/pisto de /fremda ekster/land'

(×:; **Tagne/bul', falas /pluv' ; Ne tag/iĝas nun an/koraŭ ; sed /tamen ta/giĝas dum/tempe.)**

'2 Jununjon en la sinon prenas tiu ŝipa vir' kaj ŝipe al la fremda lando estas nun la ir'

'3 "Ho kara vi ŝipisto, min relasu al terlanĉ' ĉar hejme ploras la infanoj kaj mia fianĉ'"

'4 "Kaj vidas mi je junulina flava harar' ke sur tiu neniam estis nuptokrona star'

'5 Kaj tamen vidas mi je junulina eta fingr' ke sur tiu neniam estis iu nupta ring'

'6 Ne venos junulino re al patra bien' ĝis ŝi ricevis knabon kiu ŝipon stiros jen

'7 Ne venos junulino re al patra bien' ĝis naskis ŝi knabinon kiu kudros per silkfaden'"

'8 Jununjo sur ferdeko iras en ridet' kaj plor' kaj ĵetas sin en ondan profundon de l' mar'

'9 Kaj ŝipis la ŝipisto kaj naĝis junulin' kaj junulino al la tero antaŭis lin

'10 Kaj de si li forĵetas marjakon la bluan kaj sube 'stis mantelo kun silkaj la ŝnuroj

'11 "Ne estas mi ŝipisto, kvankam kredas junulin' mi estas la plej bona anglalanda reĝofil'"